

**Kluba Programo:****novembro:**

- 2: Literatura Vespero (IBIS Shoreditch)
- 9: Klubanoj: Raportoj pri kongresoj kaj kunvenoj partoprenitaj dum la somero (Dioramo) (1800h Konsilantaro)
- 16: Lingva Vespero (IBIS Shoreditch)
- 23: Jorge Camacho: "Palestino *Strangolata*" / "*Brulvunde*" – deklamo de siaj poemoj kaj kundiskuto kun la publiko
- 30: Literatura Vespero (IBIS Shoreditch)

**decembro:**

- 7: Lingva Vespero (IBIS Shoreditch)
- 14: Zamenhofa Vespero – Bill Chapman: Kial Esperanto sukcesis (1800h Konsilantaro)
- 21/28 dec, 4 jan:  
Neniu kunveno

**januaro 2019:**

- 11 Novjara Festo

**Esperanta Kalendaro:**

27 dec-3 jan17a Novjara Renkontiĝo (NR), Wiesbaden, Germanio.  
[www.esperantoland.org/nr](http://www.esperantoland.org/nr)  
20-27 julio 2019: 104a Universala Kongreso, Lahtio, Finnlando. [www.esperanto.fi/uk2019/](http://www.esperanto.fi/uk2019/)

**Aliaj anoncoj:**

*Prezentu ĉefprogrameron! Se vi havas taŭgan temon kiu amuzos aŭ informos klubanojn, ne hezitu proponi vin al la program-sekretario.*

*Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 11a decembro por mencio en la sekva Kluba Bulteno.*

**“Norma prononcado” de nia lingvo – ĉu tio eĉ ekzistas?**

Tiuj klubanoj kaj gastoj kiuj ĉeestis en 12 oktobro, kiam Ariel Bonkorpa prelegis pri ĉi-supra temo, ja havus propran opinion(ĉu eble konvinkon?) pri respondo ĝusta; aliaj bedaŭru sian foreston, kaj plulegu!

Kvankam oni aŭdas en aliaj lingvoj sonojn, kiuj similas al tiuj de Esperanto, tamen ekzistas konstatablaj diferencoj inter la prononcado de silaboj idente skribataj. Ariel prezentis por ni sciencan esploron sian pri diferenco tia – la preciza momento kiam voĉkordoj komencas aŭ ĉesas vibri dum prononcado de plozivo (“eksplosa” konsonanto) inter vokaloj. Oni sciis jam, ke denaskaj parolantoj de etna lingvo – ekz. la germana – kongruas tiurilate inter si, sed diferencas de denaskaj parolantoj de alia – ekz. la franca. Oni povus diri, ke por ĉiu el la lingvoj ekzistas “norma” prononcado de ekz. la silabo “pa-”.

Sed ĉu ankaŭ en parolata Esperanto ekzistas tiaj normoj? Tion esploris Ariel per registrado kaj posta analizo de la voĉoj de kongresanoj diverslandaj, kiuj devis por tio voĉlegi plurajn mallongajn frazojn, jen en propra nacia lingvo (germana, franca, slovaka), jen en Esperanto. Fontis, el amasego da mezuritaj tempodaŭroj, kelkaj simplaj, klaraj grafikaĵoj, montrantaj ... nu, kion? Mankas ĉi tie spaco sufiĉa por prezenti kaj ekspliki grafikaĵojn, sed la eksperimento meritas, kaj espereble ricevos, ampleksan raporton en estonta numero de esperantlingva periodaĵo. Tion do atendu – se vi volas scii, ĉu via prononco estas ja “norma”.

TGP

**Ĉiel laŭregule!**

Ĉiu klubano, kies membreco estas nek Dumviva nek Honora, ricevos kun Bulteno januara-februara reaniĝilon. Tion subskribante, oni interalie “... akceptas la regulojn de la klubo”. Dubeblas, tamen, ĉu ĉiu subskribanto ja posedas kaj konas la broŝureton, en kiu estas listigitaj la reguloj de LEK. Se vi ial ne ricevis (aŭ iel perdis) tiun broŝureton, bonvolu tion diri al la Kluba Registristo (anica\_page@btinternet.com), por ke oni povu sendi al vi, kune kun via novjara Bulteno, ekzempleron de LaRegularo.

En marto ĉiujara okazas la jarkunsido de LEK. Pri ties tagordo informas paragrafo 6(b), pri elekto al funkciaj oficoj paragrafo 7(b) kaj pri devoj kaj rajtoj de Konsilantoj paragrafoj 8(a,b,c). La nuna Konsilantaro jen invitas vin proponi kandidato(j)n por tiuj elektoj. Povas esti aŭ vi mem, aŭ alia(j) konsentinta(j) klubano(j). En la Konsilantaro por 2019-20 aŭdiĝu novaj voĉoj!

## Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere, en iu el du lokoj:  
Diorama Arts Studios, 201 Drummond Street,  
NW1 3FE (por kunveno kun programo);  
Ibis London City - Shoreditch Hotel, 5 Commercial  
St, London E1 6BF (por diskutvespero)

Kutima programo ĉe Dioramo:

18:00 lingvokurso(j) kaj/aŭ konsilantarkunsido  
19:15 - 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero  
20:15 - 20:45 paŭzo  
20:45 - 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la  
ĉefprogramero  
22:00 fino

Dioramo: Metrostacio: Warren St (linioj "Victoria",  
"Northern"), Euston Square ("Hammersmith & City",  
"Circle"), Regents Park ("Bakerloo").

Fervojo London Overground: Euston

Busoj: 10, 14, 18, 24, 27, 29, 30, 73, 88, 134, 205,  
390, 453, C2.

Ibis (Shoreditch): Metrostacio: Aldgate East - uzu la  
eliron nro 2 (Toynbee Hall); (linioj "Hammersmith &  
City", "District"); Aldgate (linioj "Circle"  
"Metropolitan").

Busoj: 15, 25, 67, 115, 135, 205, 254.

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.

Kluba retejo:

<http://www.esperanto.org.uk/lek/lek.htm>

Lokaj grupoj: Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346

rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo


020-8672 8095 [esperanto-sleg@tiscali.co.uk](mailto:esperanto-sleg@tiscali.co.uk).

"Nordlondona sekcio: Anthony Bodineau 07950774360

[anthony@esperanto.org](mailto:anthony@esperanto.org)"

Federacioj: Orienta: Roy Simmons (vidu supre);

Sudorienta: Kevin Murray, 11 Leybourne Ave, West Byfleet,  
Surrey KT14 7HB 01932-345779 [yarrump@gmail.com](mailto:yarrump@gmail.com).



## Prelego pri Zamenhof en Juda Kultura Centro (anglalingve)

A Celebration of Ludwik Zamenhof, the creator of  
Esperanto – Agnieszka Kajdanowska

7 novembro, 7:30pm, JW3, 341-351 Finchley Road  
NW3 6ET (biletoj £12-£15)

<https://tinyurl.com/y9ut4agp>

## Gratulon al nia klubano Maurizio Giacometto, nova redaktoro de EAB Update.

Estas anoncite en la aktuala eldono de *Update* ke  
Maurizio fariĝos nova redaktoro ekde la sekva  
eldono en januaro.



Hi!

New editor  
Maurizio  
Giacometto



Bye!

Departing  
editor Tim  
Owen

Funkciuloj: Honora Prezidanto: Prof. John Wells; Honoraj Vicprezidantoj: Heleno Fantom, Joyce Bunting.

Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Matt Peperell (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Renato Corsetti, Roland England, Chris Lewis, Terry Page, Antony Rawlinson (Bultenisto).

Adreso: David Thornell: [lek.sekretario@gmail.com](mailto:lek.sekretario@gmail.com); Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ

[ap\\_esp-lek21@yahoo.co.uk](mailto:ap_esp-lek21@yahoo.co.uk), Terry kaj Anica Page: 7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP [terry\\_page@btinternet.com](mailto:terry_page@btinternet.com),  
[anica\\_page@btinternet.com](mailto:anica_page@btinternet.com), Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY [acj.rawlinson@ntlworld.com](mailto:acj.rawlinson@ntlworld.com).